



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

MARÇO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 43

REDAÇÃO:— Maria Almada

64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazos en Lucerno, Svislando, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1979. Laŭ la revuo "Esperanto", ĝis la fino de januaro aliĝis 911 personoj el 43 landoj.

En tiu ĉarma kaj mondfama lando certe la kongresanoj ĝuos specialan kongresetoson, ne nur pro la beleco, kiun Lucerno ofertas, sed ankaŭ pro bone organizita Universala Kongreso.

Svislando iĝos vera Esperantujo dum 8 tagoj, en kiu la partoprenontoj komprenos unuj la aliajn pere la internacia lingvo kaj vivos pace, gaje kaj frate.

Por la UK la svisa poŝto eldonis specialan poŝtmarkon Esperant-lingve kaj ankaŭ oni uzos poŝtstampon dum la kongreso. Tio signifas, ke ankaŭ la filatelistoj estos kontentaj.

La evento certigas ankoraŭfoje, ke la esperantistaro pere de sia idealo kaj lingvo meritis atenton de la moderna mondo.

ESPERANTISTA DELEGACIO ĈE ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

La prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin kondukis kvarpersonan delegacion la 8-an de januaro, 1979, en Parizo, (Francujo), al S-ro Amadou Mathar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko. Dum la duonhora konversacio la delegacio havis okazon ĝisdatigi la sciojn

de la ĝenerala direktoro pri la progreso de la Esperanto-movado kaj UEA, espriminte ankaŭ sian deziron, ke Unesco pli sisteme esploru la malhelpojn al la baza, interpersona komunikado. S-ro M'Bow konsentis, ke tiu baza komunikado estas ege grava!



En la bildo: Dr. L.L. Zamenhof kun majoro Yemans el Usona Armeo kaj S-ino Zamenhof. La 15-an de aŭgusto 1910, en Vaŝingtono, USA.

Li partoprenis en la 62-a UK en Rejkjaviko (Islando) je invito de UEA. D-ro Tonkin lin atentigis, ke UEA maltrankviliĝas pro kelkaj starpunktoj de la Internacia Komisiono pri problemoj de Komunikado.

D-ro M'Bow petis, ke UEA sendu rekte al li kopion de siaj rimarkoj pri la provizora raporto de la komisiono pri komunikado. Samtempe la ĝenerala direktoro interesiĝis pri la progreso de Esperanto kaj menciis, ke li ankaŭ post sia partopreno en la Rejkjavika kongreso renkontiĝis kun esperantistoj en San-Marino kaj diris: "Mi bone memoras la etoson de via kongreso en Rejkjaviko. Temis pri vere frateca okazaĵo. Se ĉiuj homoj povus komuniki kiel vi, ne ekzistus la nunaj streĝigo en la mondo. En neniu alia loko mi renkontis tiun etoson. Mi devas diri, ke en Rejkjaviko mi havis komplekson, nome ke mi ne esprimis min en Esperanto. Se eventuale mi ĉestos denove vian kongreson, mi dezirus paroli en Esperanto" (El "Esperanto" N^o 878-79).

MONO RICEVITA

Afable donacis por la bulteno la jenajn sumojn niaj samideanoj:

Claudio Zimmermann	100,00
José Agostinho Santana	100,00
Luiz A. Parreiras Menechino	200,00
Carlos A. Siqueira da Cunha	500,00
Espto - Societo de Bauru	90,00
Nelson Pereira de Souza	500,00
Major Gilberto A.S. Velho	200,00
Ary Zamora	200,00
Sumo	1.890,00

INTERNACIA GEEDZIĜO

Nia korespondantino el Hungario, sam-ino Eva Kiss, edziniĝis en la 6-a de januaro pasinta al s-ano Jürgen Hamman, orientgermano el Lejpsigo.

La ejo, kie okazis la geedziĝceremonio estis ornamita per hungara, germana kaj esperanta flagoj. La ceremonio finiĝis per la kantado de la Espero. Ni gratulas kaj deziras al niaj samideanoj feliĉon kaj longan vivon.

La hombro de la esperantistaj familioj pli kaj pli kreskas.

La geedza paro loĝos en Lejpsigo, orienta Germanio.

Argentino — Alvenis el Argentino "Fulmo-kurso en 10 lecionoj" Esperanto-Hispana, de nia s-ano Ergoto el Bonaero. Al interesatoj pri bone organizita kurso ni rekomendas kaj informas la adreson: Instituto Argentino de Esperanto C.C. 50 - SUC. 12, 1412 — Buenos Aires, Argentina.

"Krucenigmoj kaj Humoro", ankaŭ interesa libro, vendata de Kultura Kooperativo de Esperantistoj — Rio de Janeiro (RJ) Cx. Postal 1887 — 20.000. Temas pri bonega distro kaj instrua verko por esperantistoj.

BALADO PRI ŜOFORO

Maria Almada

Ĉe la direktilo sidas
la memfido pligrandiĝas
kaj li la kontento gvidas
fine fiera fariĝas.

Kilometro — sensignifas;
dum sekundo estas for
arboj, fosto kaj signiloj
estas neni'al ŝofor'

Tamen foje pripensante
li dum grumblas nur ripetas:
"Diablo' la homoj kvante
apud vojoj fostojn metas!

Kun grandega rapideco
(tio estas ja la kosto)
en tempo ne atendita
kurŝvingiĝas al la fosto.

Kruron rompis, ripojn tranĉis
rimarkiĝis post la krako,
nazo sangis, fingro mankis
dispeciĝis lia brako.

Li ellernis kaj jam kredas
al aliaj pretas ĵuri:
ke la homo cel' atingu
ne bezonas nepre kuri!

GRAVA ATENTO!

Ni petas al niaj karaj vicprezidantoj ĉeesti la Sciencon Simpozion, en Marilia, la venontan aprilon, kaj ankaŭ la perantoj de la organizaĵoj, kiuj konsistigas nian Konsilantaron pro gravaj decidoj rilate nian organizaĵon.

ĈU VI SCIAS? ...

Ke la bongusta frukto banano estas unu el la plej malnovaj kreskaĵoj sur la

tero? Oni kredas, ke la fruktotrunko kreskis unue en la suda Azio.

Ke la unua gazeto aperis em Romo, en la epoko, kiam Julius Cezaro estis konsulo. Ĝi titoliĝis "Akta Diurna" kaj estis montrita en publikaj placoj.

Ke Markus Silvius Oton (32-69), reganto en Romo, havis eksterordinaran memorkapablon, precipe li memoris pri propraj nomoj. Laŭ la historio li parkeris la tutan nomon de ĉiuj soldatoj de siaj tri legioj.

SKOLTA MOVADO EN BRAZILLO

Laŭŝajne en Brazilo la skolta movado estas vekiganta. La reprezentanto en nia lando estas sam-no Adonis Marcelo S. Silva, nia vicprezidanto, kiu sendis al ni abundan materialon pri la oraganizaĵo.

Neniel estis tiel grava kiel nun, ke niaj plej junaj gejunuloj konatiĝu kun skolta movado. Krom la internacia jaro de la infanoj, kiu intencas plibonigi la vivon de estontaj plenkreskuloj, ekzistas kampanjo pri la konservado de la naturo lanĉita de la katolika ĉefpastro Johano Paŭlo la II-a. Ĉio ĉi iĝas necesa instrui la infanojn ami la naturon kaj konservi ĝin.

La etuloj en la skolta movado lernas ordon, iĝas pli amikaj kaj utilaj al la homaro, kial ne rekonu, ke ili iĝas pli sanaj kaj pli feliĉaj?!

Estus bone, ke en nia lando la skolta movado iĝus pli populara. Ĉio dependas de bona propagando, kiu klarigus al la infanoj, sed precipe al la gepatroj la utilecon de la skolta vivo.

La skoltoj anstataŭ aŭtomobila venturado utiligas la marŝadon al la arbaro. Sana maniero vivi, precipe al tiuj infanoj, kiuj estas loĝantaj en konstruaĵoj de urbocentroj. Certe la streĉeco estas malpli ofta, ne nur ĉe la etuloj, sed ankaŭ ĉe la gepatroj.

En Eŭropo la skolta movado estas bone konata kaj ŝatata. Kutime la gejunuloj fine de semajno grupe partoprenas ĝin ekster la urbocentroj.

Dum la libertempoj oni organizas internaciajn renkontiĝojn.

Jen taŭga kampo por la disvastigado de Esperanto. En la internaciaj skoltoj renkontiĝoj la interlingvo havas gravan rolon pro la bona interkompreniĝado.

Estas konsilinde, ke en ĉiu urbo la

esperantistaro, krom la lingvo mem, faru propagandon ankaŭ pri la skolta movado.

Pliajn informojn donos S-ano Adonis M. S. Silva — CEP 35180 - Acesita (MG) - Caixa Postal N^o 192, reprezentanto de la Skolta Esperanto-Ligo.

I-A NORDORIENTA ESPERANTO RENKONTIĜO

En Natal (RN) okazos la I-a Esperanto-Renkontiĝo, de la 12-a ĝis la 15-a de aprilo venonta, organizata de Brazila Esperanto-Ligo.

La baza programo de la kongreso estas: Enkonduki. Esperanton en la Universitatojn de la orienta parto de Brazilo kaj plani trijaran agadon en Rio Grande do Norte. La aliĝkotiĝo: Cr\$ 500,00. Adreso: Potigvara Esperanto-Asocio, A/c de Ivaldo Alves de Souza QCG da Polícia Militar — CEP 59.000 Natal (RN).

Kun plezuro ni konstatas laŭ letero de s-ano Ivaldo de Souza, ke la movado vigliĝas en Natal. Certe la renkontiĝo multe helpos nian movadon.

La societanoj luis ĉambron kaj nun havas propran sidejon, kie funkcias la organizaĵo. Estas preparata ekspozicio kaj estas antaŭvidata helpo ankaŭ de la urbkonsilantaro, gazetaro kaj universitato. Ni gratulas kaj deziras sukceson!

14-A SEMINARIO DE ESPERANTO EN UBERABA

Ĉijare la 14-a Seminario de Esperanto, programita de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj kune kun Esperanto-Asocio de Uberaba, de la 19-a ĝis la 22-a de julio 1979. Aliĝkotiĝoj: Ĝis la 30-a de marto Cr\$ 200,00; ĝis la 30-a de aprilo Cr\$ 300,00; post la 30-a de aprilo Cr\$ 400,00.

La gejunuloj ĝuas la rabaton de 50%, same la edzino kaj akompanantoj. La kotizon oni sendu al KKE, Avenida 13 de Maio, 47, sobreloja 208 — CEP 20.031 ou Caixa Postal N^o 1887 — CEP 20.000 Rio de Janeiro (RJ).

MARILIA (SP) INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO

Okaze de la 50-jara jubileo de Mari-

lia, la urbo de la I-a Latin-Amerika Kongreso de Esperanto gastigos, de la 13-18-a de aprilo venonta, sciencistojn el pluraj landoj, inter kiuj troviĝas Argentino, Belgio, Danlando, Germanio, Italio, Japanujo, Norvegio, Urugvajo, Venezuelo, Francio, Usono kaj Brazilo.

Aliĝokotizoj ĝis la 28-a de februaro Cr\$ 200,00 kaj ek de la 3-a de marto Cr\$ 300,00. La eksterlandanoj havas kotizon je US\$ 12,00. — Aliĝo kun Prof-ro Wilson Ferreira Martins - Cx. Postal 556 - 17.500 - Marília (SP), ĉu per ĉeko, poŝtmandato aŭ pagordono pere de banko. **PROGRAMO:** 1) Kompara lingvistiko kaj Interlingvistiko kaj ilia apliko al evoluigintaj landoj; 2) Problemoj de Informado pri Kemio, precipe en evoluigintaj landoj; 3) Klerigteknologio kaj Komunikadscienco kaj ilia apliko al evoluigintaj landoj; 4) La Rolo de Fremdlingvoj en la Instruado kaj Praktiko de Medicino kaj Natursciencoj, precipe en evoluigintaj landoj.

Loko: San-Paŭlo Medicina Asocio - Av. Pedro de Toledo, 179 - Tel.: 33-5246.

La Simpozio estas aŭspiciata de la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, Sekretariejo por Scienco, Kulturo kaj Teknologio de Ŝtato São Paulo, kaj Urbodomo de Marília. Organizantoj: Fakultato pri Edukado, Filozofio, Sociaj Sciencoj kaj Dokumentado — "Campus de Marília", Universitato "Julio de Mesquita Filho", Fakultato pri Medicino de Marília kaj Fondaĵo "Padre Anchieta", de São Paulo.

Informas ankoraŭ nia vicprezidanto Wilson Ferreira Martins, ke la TENDA HOTELO, sur la strato Sete de Setembro, 35 - Telefonoj 33-3741 kaj 33-2588, Marília (SP), kiu plibonigis siajn instalaĵojn kaj ilin preparis por gastigi komforte la partoprenontaron de la Simpozio, decidis fiksi je Cr\$ 350,00 la prezon por unu tuta tago — noktado kaj kompleta manĝado — kio ja estas tre favora por la gastigado.

TRA BRAZILO ...

Fortaleza (CE) — Alvenis gazet-eltranĉaĵo, sendita de nia vicprezidanto D-ro Cesar Barros Leal, el Fortaleza, aperigante propagandon de li faritan pli pluraj libroj, inter kiuj troviĝas "Esperanto

sen Antaŭjuĝo" de nia kara vicprezidanto D-ro Walter Francini, kaj "Esperanto Elementar" de nia prezidanto, s-ano F. S. Almada.

S-ano Leal informas nin, ke okazis en la pasinta monato februaro ekspozicio pri Esperanto en la centro de la urbo, kiun inaŭguris la senatano José Lins de Albuquerque, utiligante Esperanton, kaj poste li ĉeestis programon de TV kaj tie li denove parolis esperante.

Laŭ la informoj de s-ano Leal la movado marŝas kontentige en Fortaleza, dank' al klopodoj de la senatano kaj de li mem.

Salvador (BA) — Bahia Esperanto-Asocio estas gratulinda pro la bonega laboro de ĝia anaro, kiu senĉese batalas por la Zamenhofa idealo.

Sub la gvidado de ĝia prezidanto, Isao Noguti, helpata de prof-ino Vivaldina Caymmi estas organizata la 20-a Brazila Esperanto-Kongreso por la jaro 1980-a, kunlabore kun KKE, BEL kaj BKE.

S-ano D-ro José Siquara da Rocha, prezidanto de la Organiza Komitato de tiu 20-a kongreso, invitis la prezidanton de Brazila Konsilantaro de Esperanto, F. S. Almada, patroni la okazontan eventon, kion li kun granda plezuro akceptis, kaj laŭeble, plibone helpos la kongresan Komitaton.

BKE estas bone reprezentata pere de siaj vicprezidantoj Raymundo Pitanga Rocha kaj José Saraiva Matos, kiuj ĉiam estas pretaj helpi nian movadon, celante unuigi kaj fortikigi la kadron de nia anaro en Bahia kaj Brazilo.

Brasília (DF) — Nossa nova e belíssima Capital é nosso orgulho, a qual deverá acolher o nosso primeiro Congresso Universal de Esperanto no ano de 1981.

Muitas pessoas se dirigem para lá de todas as partes do nosso vasto País, e, sendo esperantistas, procuram a sede do Conselho Brasileiro de Esperanto, mas... não a temos ainda... razão pela qual a diretoria do Conselho resolveu promover uma campanha no sentido de poder-se adquiri-la. A sede será o ponto de encontro de todos os nossos coidealistas do país e do mundo. Muitas embaixadas têm pessoal

que fala o Esperanto e quando chegam a Brasília não sabem a quem se dirigir.

O Brasil é tão grande que não pode prescindir de uma sede esperantista condigna na sua Capital. Esta é a razão pela qual o Conselho Brasileiro de Esperanto deliberou esforçar-se para adquirir sua sede, isto é, um local para acolhida do movimento esperantista. Assim, todos que vão à nossa Capital acharão um lugar para aonde se dirigir.

RICEVIS NIAN CIRKULERON KAJ ALIĜIS, AL KIUJ NI DANKAS:

Carlos A. Siqueira da Cunha, F. S. Almada, Nelson Pereira de Souza, Modesto, Belmonte de Abreu, Alan Kardec A. Costa, José Cecilio de Cavalho, Nelson Ribeiro, Francisca Martos, Nydia Aydos Krieger e Ivone Aydos Krieger, kiuj reprezentas Cr\$ 100.000,00.

Vortoj de nia s-ano Alan Kardec: "Vin ĉiujn mi varme gratulas pro la bela iniciato, kiu sendube bone sukcesos".

Carlos Augusto Siqueira da Cunha—S-ano Cunha, financa direktoro de nia BKE, alta funkciulo de Banco Central do Brasil, nun emerita, multe laboras por nia movado en Brazilio. Kompetenta esperantisto, klopodema s-ano kaj amiko, surprizigis nin pere de sia bela poeziaĵo, kiun Banco Central en siaj analoj publikigis kaj prof-ro F.S.Almada tradukis esperanten. Jen la poeziaĵo:

LA ALMOZULO

Sur la ŝtuparo de l'vasta perono
etendiĝanta de l'preĝeja pordo,
maljuna almozul', de putra ordo,
rampas de l'sunnaskiĝ' ĝis ĝia drono.

El lia pala frunt' la ŝvit' elgutas
dum al popol' malplenan manon donas,
surdaj, blindaj pasantoj ja ne konas
veojn, kiujn la malriĉul' kondutas

Verŝajne tiu tuta gent' iranta,
kiu ĉe l'almozul' estas pasanta
ignoras lian dramon de l'animo. . .

En lia brust' la vundo, la amaro,
kompensanta pri lia granda faro:

— Milithroo post batala fino! . . .

Gratulon, s-ano Cunha!

Juiz de Fora (MG) — La 11-an de marto kuranta kunsidis en la hejmo de nia vicprezidanto Prof-ro José Passini, en Juiz de Fora, pluraj esperantistoj de tiu progresema urbo, kunvokitak de nia diligenta s-ano Reinaldo Zaghetto. Ĉeestis la prezidanto de BKE, F.S. Almada kaj lia edzino Maria Almada, redaktorino de ĉi tiu bulteno, krom aliaj 15 personoj.

Post longa stagnado la Esperanto-Klubo de Juiz de Fora ekmoviĝis. Oni priŝtraktis ĝian vigligon, elekton de nova estraro, ktp., kio okazos post nelonga prilaboro.

La geedzoj José kaj Norma Passini akceptis frate la ĉeestantaron, inter kiuj troviĝis kelkaj gesamideanoj, kiuj dum longa tempo ne aktivis.

En la hejmo de Passini regis afabla kaj amika etoso, kiun ĉiuj ĝuia, ĉar oni sin sentis en esperantujo.

S-ano Zaghetto anoncis organizadon de nova kurso helpe de s-ano Marcilio. En la sama urbo "Diário Marcantil" intervjuis la prezidanton de BKE, Prof-ron Almada, kiu informis pri la okazonta Scienca Simpozio en Marília (SP) en aprilo.

La mag. Passini donacis al BKE, helpe al nia bulteno, kelkajn ekzemplerojn de la tezo, kiun li defendis pri Esperanto ĉe PUC (Pontifícia Universidade Católica), Rio de Janeiro, por disvendi. Al intereso al ni petas, bonvolu sin turni al nia redaktejo - Santos. Prezo: Cr\$ 100,00. Ni antaŭdankas al aĉetontoj, kiuj tiamaniere helpas la eldonadon de nia bulteno, kiuj estas disdonataj senpage jam de 4 jaroj.

Rio de Janeiro (RJ) — Ni rivevis abundan materialon de s-ano Silvio Malheiros, laŭ kio li atestas la prelegon, kiun li faris pri Esperanto ĉe la "IV - Congresso Nacional de Estudos Linguísticos e Literatura" en SUAN. La temo estis "Caos Linguístico (o problema é Esperanto a solução).

S-ano Malheiros jam plurfoje havis okazon paroli al centoj da gelernantoj, laŭ lia ŝciigo kaj pro tio li estis invitita de profesoroj pri filologio kaj angla lingvo por paroli pri Esperanto.

Ni gratulas kaj deziras sukceson al nia kara s-ano Silvio Malheiros.

Spirita Eldona Societo "Valdomiro Lorenz" - Caixa Postal Nº 3.133 - 20.000 Rio de Janeiro (RJ), havas bonegajn li-

brojn. Verkoj de prof. Humberto Rohden, kun malsamaj prezoj. La eldonejo donas rebaton de 50% se oni mendas pli ol 10 ekzemplorojn.

Aĉetu bonajn librojn! Legu pli!

Barra Mansa (RJ) — BAMEK — Barra Mansa Esperanto-Klubo kreskas kaj aperas. Jam estas bone konta en la urbo, Laŭ la Leĝo N^o 1496 ĝi estas rekonita de publika utileco.

La prezidantino, s-ino Denise Deslandes, en la nomo de la Esperanto-Klubo estis invitita en septembro pasinta planti arbon en la kampo de la Fakultato kaj poste la arbo ricevos la nomon "BAMEK". Same ŝi estis invitita al la enpostenigo de la estraro de "OAB - Ordem dos Advogados do Brasil". Krome la klubo organizas kurson ĉimonate. Ni gratulas al la direktoraro, aparte al la prezidantino pro la bona agado en nia movado. Estas imitinda la laboro de BAMEK.

São Paulo (SP) — S-ano D-ro Arnaldo Viana, jam de longe laboras en nia movado. Li instruis al multaj personoj la internacian ligvon, ĉar li jam tion faris pere de "TV Educativa" en San-Paŭlo. Li jam estis prezidanto de San-Paŭlo Esperanto-Asocio kaj senĉese li instruas la lingvon en lernejoj de São-Caetano do Sul. La urbestro de tiu industria urbo, s-ro Samuel Massei, pere de Leĝo n^o 120 de la 13-a de januaro 1976 permesis la instruadon de Esperanto en la lernejo "Senador Flaque" ĉar la kurson gvidas s-ano Arnaldo Viana.

En la sama lernejo li organizis konkurson de infandesignaĵoj kaj 4 el ili gajnis premion.

S-ano Viana sendis al ni kanton, kies teksto kaj muziko estas de li kreitaj. Jen la kanto:

Kanto de la gesamideanaro

Ni kantu, gesamideanar!

Kantante ni kunlaboras por paco
de l' homar!

Ni estas gefeliĉular!

Ĉar kantante ni laboras por paco
de l' homar!

Ho! Kara gefratar!

Ke Dio benu vin kaj helpu nian laboron

por la homar!

Bauru (SP) — S-ano Antonio João Fraga Padilha sendis al ni gravajn informojn kaj samtempe korektis nian sciigon en la Bulteno 42, ke li instruas ĉe iu fakultato.

Li gvidas bazan kurson "Zamenhof" ĉe "Escola Progresso" ĉiuvendrede; mezgradan kaj konversacian kursojn en la sama lernejo, merkrede, gvidas s-ano Ivon Barbosa, vicprezidanto de BKE. En la lernejo "Progresso" gvidas kurson vendrede s-ano Euclides G. Carvalho, ankaŭ nia vicprezidanto. Ĉe pluraj gesamideanoj funkcias lerno-rondetoj en iliaj hejmoj.

En la FAFIL kaj PUC ankaŭ funkcias Esperanto-kursoj sub la gvidado de Léa Silva Braga de Castro Sá. Ŝi estas katedra profesorino.

Krom tiuj personoj, ankaŭ instruas la jenaj gesamideanoj: s-ino Alice Aparecida M. de Carvalho, José dos Santos Simas kaj Edson Levy R. Amorim.

En la propagandilo de la "Escola Progresso" ni ĝoje legis, la oferton de la instruado de Esperanto.

La gazeto "Jornal da Cidade" aperigis gravan artikolon pri la agado de la societanoj kaj pri la Internacia Scienca Simpozio en Marília.

Krome la societanoj faras kampanjon por aĉeti propan sidejon.

Ni deziras bonŝancon al baŭruanoj, ili meritas kaj ilia laboro estas laŭdinda!

Kore ni dankas la informojn senditajn de s-ano Padilha.

Sorocaba (SP) — La Sorokaba Esperanto-Klubo senĉese aktivas en sia ĉarma urbo. Ĝia prezidanto, s-ano Eluizio B. Rodrigues kune kun la vicprezidanto de BKE, Blaz Garcia, fortostreĉe klopodas akiri propran sidejon. Kiu deziras helpi al ili, ni informas, ke la "briko" kostas po Cr\$ 200,00.

En la pasinta decembro okazis filatela ekspozicio tie kaj ĉijare okazos kursoj pri Esperanto promociitaj de la klubo.

Caçapava (SP) — S-ano Gilberto A. Silva Velho, nia vicprezidanto, bonege aktivas por nia movado.

Li vizitadas plurajn urbojn de San-Paŭlo. Nuntempe li tion faris en Itu, kie li kontaktis la esperantistojn, vizitinte la

kursgvidantojn.

La samon li faris en Jundiá, Sorocaba kaj Taubaté. Kie ne ekzistas kursoj, li ilin organizas kaj helpas ĉiamaniere organizi ilin. Li sendadas artikolojn al diversaj gazetoj, ĉiam rilate Esperanton. Nun lia agado ampleksiĝis, ĉar li eklaboris en aliaj ŝtatoj, kiel en Alagoas, Paçaná, Santa Catarina, ktp. Li sendis al ni belajn versaĵojn:

As rosas consagradas
à Virgem Maria
foram em jangada levadas
com muita festa e alegria.


São Carlos (SP) — La ĵusbakita Esperanto-Klubo de São Carlos jam estas organizinta kursojn elementan kaj progresigan.

La prezidanto de la klubo, s-ano Paulo Domingos Caruso faras propagandon en la gazeto "O Diário", de São Carlos, kies direktoro aperigas sciigojn pri la Esperanto-movado.

Ni deziras sukcesplenonan laboron al niaj karaj sankarlanoj.

São Miguel Paulista (SP) — En la 25-a de la pasinta januaro festis sian 30-an datrevenon la Esperanto-Klubo Zamenhof, kiun ĉeestis pluraj gesamideanoj. Inter ili troviĝis niaj gevicprezidantoj Elvira Fontes, Gilberto A. Silva Velho, Nelson Silveira kaj Oswaldo Pires de Holanda, prezidanto de la klubo.

Bedaŭrinde la pluvĝo ne permesis atingi São-Miguel-Paulista'n al Prof-ro Almada kaj Maria Almada, deviginte ilin reveni el San-Paŭlo, pri kio ni tute



Sur foto estas niaj gevicprezidantoj:
Elvira Fontes, Gilberto A. Silva Velho,
Nelson Silveira.

ne atendis. Ni gratulas al niaj gesamideanoj kaj deziras daŭran sukceson.

Guarulhos (SP) — En ĉi tiu urbo aktivas nia vicprezidanto D-ro Lacorday Andrade, kiu gvidas kursojn, bone propagandas la internacian ligvon kaj helpas nian movadon senĉese.

Ni gratulas nian senlacan vicprezidanton kaj kunlaboranton, kiu sukcesis per sia kapableco vigligi la movadon en Guarulhos.

San-Paŭlo (SP) — San-Paŭlo Esperanto-Asocio estas unu el la plej aktivaj en nia lando. Multe helpas la propra sidejo, kiun multaj personoj vizitadas ĉiutage. Ĝia diligenta prezidantino, Elvira Fontes, zorge direktas ĝin kun mirinda kompetenco kaj amo al nia movado.

La propra sidejo estas grava en ĉiu urbo, ĉar oni okazigas tie kursojn, kunvenojn kaj amikajn renkontiĝojn.

La ejo sendube kontribuas por ke la movado iĝu pli forta kaj internacia lingvo disvastiĝu facile.

En la jaro 1963-a la tiama direktoro de la Asocio decidis aĉeti propran sidejon. Oni kunvokis la anaron, kiu sen heziti pruntis kaj donacis la monsumon necesan al entrepreno.

Tiun kampanjon gvidis la jena grupo de konataj gesamideanoj: la tiama prezidanto, s-ano Adolfo Muniz Furtado, kiu kun nemezurebla forto kaj bonvolo direktis ĝin, sed li ne estis tutsola, partoprenis tiun kampanjon nia nuna vicprezidanto Nelson Silveira, kies kunlaborado estis netaksebla. Aliaj same gravaj kunlaborantoj estis Eurico Antonio Ribeiro, tiam unua kasisto de la Asocio, kaj la dua kasisto estis s-ano U. de Carvalho. Multe laboris ankaŭ s-ano Edmundo Spina, Nilza Barcelos, Maria Stella Thomazzi kaj la nuna prezidantino Elvira Fontes.

Ĉiuj apartenis al la sama grupo. Kompreneble, multaj aliaj personoj kunlaboris por la sukcesa aĉeto de la sidejo. Pro manko de informoj ne eblas al ni aperigi la nomojn de aliaj kunlaborantoj. Ni dankas la informojn, kiujn ni aperigas al nia vicprezidantino Elvira Fontes.



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalho, 31 - Ap. 73
Telefone 4 8033
11:00 - Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 - 1.182
Telefone 42-0090
70.000 - Brasília (DF)

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

CGO 00 406 504/001 06 - Brasília

Distrito Federal

BALANÇO GERAL EM

31-12-78

ATIVO

I - Disponível

CAIXA	5.226,39	
BANCOS	2.701,02	Cr\$ 7.927,41

II - Realizável

BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO		Cr\$ 860,00
--------------------------------	--	-------------

III - Imobilizado

IMPRESSOS E OBJETOS DE ESCRITÓRIO		Cr\$ 300,00
		Cr\$ 9.087,41

PASSIVO

I - Não exigível

FUNDO SOCIAL		
Ano Anterior	6.176,86	
Incremento - 1978	2.910,55	Cr\$ 9.087,41
		Cr\$ 9.087,41

DEMONSTRAÇÃO DA CONTA "RECEITA E DESPESA"

DÉBITO

- DESPESAS COM CONGRESSOS	Cr\$120.000,00
- DESPESAS GERAIS	15.393,10
- DESPESAS DE MATERIAL DE EXPEDIENTE	137,75
	Cr\$135.530,85
Superavit, transferido para Fundo Social ...	2.910,55
	Cr\$138.441,40

CRÉDITO

- SUBVENÇÕES GOVERNAMENTAIS	Cr\$120.000,00
- CONTRIBUIÇÕES PECUNIARIAS, RECEBIDAS	18.164,40
- RENDAS DIVERSAS	277,00
	Cr\$138.441,40

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1978

[Assinatura]
Presidente

[Assinatura]
Nelson P.de Souza
Secretário

[Assinatura]
Carlos A.S.Cunha
Tesoureiro